

NAJBARA FOLIO

Redaktas kaj eldonas Klubo de Esperantistoj en Krzeszowice

n-ro 4/2000

REMEMORO PRI STANISŁAW CZAJOWSKI- ESPERANTISTO EL KRZESZOWICE


Mi memoras lin kiel homon, kiu ĉiam portis verdan steleton en la butontruo. Negrandstatura, ridetema, simpatia, pliaĝa sinjoro- matematikisto. Ni ambaŭ instruis en Teknikumo de Ligna Industrio en Krzeszowice. Nun, post jaroj, multe da liaj ekslernantoj rememoras kursojn de esperangaj kromlecionoj. La direktosinjoro Stanisław Górecki, so de la foto, kiun Stanisław mi legas esperantlingvan de al Staĉjo Górecki, donacis liaski. Varsovio, 8. 12. 1928." integris ilin la esperanta ligo.

Ni sukcesis kontaktiĝi kun styna Czajowska- Michalska. grafion de sia patro. Stani- de marto 1904 en Tomaszo- Krakovo. Li estis la sesa el na familio. La bazlernejon en poste li povis nur kalkuli je propraj fortoj, li elektis do vojon de memlernado kaj lernado de metioj. Li estiĝis lignaĵista majstrigonto, poste tamen li finis perfektigantajn kursojn kiuj permesis al li abiturientiĝi. De tiu tempo komencis lia interesigo pri Esperanto. Emociita per la nobla ideo kaj logikaj, raciaj principoj de la lingvo, li rapide troviĝis inter fervora, krakova samideanaro. Liaj esperantaj geamikoj instigis lin al decido komenci studojn. En 1923 li forvetu- no kaj tie en Industria – to de ensembla arkitektu- ton. Aŭstraj kolegoj espe- tempan laboron kaj mal- vitadis lin viziti muzeojn , partoprenis esperantajn do en Vieno li ricevis fin- granda travivaĵo estis par- Kongreso en 1924.



to gviditaj per li kadre de nedevi- ro de la lernejo estis tiutempe ankaŭ esperantisto. Sur la rever- Czajowski donacis al S. Górecki, diĉon: „ Al la plej amata Kolego, sincera kolego Stanisław Czajow- Ili do interkonatiĝis jam delonge,

la filino de sinjoro Stanisławo, Kry- Ŝi preparis al ni la kurtan bio- sław Czajowski naskiĝis la 23-an wice proksime de Modlnica apud naŭ infanoj de malriĉa, kampara- Modlnica li finis en 1917 jaro, ris kun kelkaj kolegoj al Vie- Arta Instituto, sur la fakulta- ro, li perfektigis mebladar- rantistoj helpis al li trovi por- multekostan loĝejon. Ili in- teatrojn kaj ekspoziciojn, li renkontiĝojn. Dum la resta- diplomon de la Instituto. Lia toprenado en la Universala



Reveninte al Pollando li komencis instruadon en la Metia- Industria Lernejo en Łuck poste en Smyda kaj Jaworów apud Lvovo- tie li edziĝis kaj fondis familion. La milito kon-

damnis eksproprigitajn gesinjorojn Czajowski al vagada sorto. En 1942 Stanisław Czajowski, kaptita dum iu homĉasado estis deportita al deviga laboro en Gölsdorf en Brandenburgio. Post la milito li laboris unue en Jasieniec apud Varsovio, poste de 1947- en Krzeszowice. La instruadon de matematiko ofertis al li la supre menciita, esperanta kolego el studoj en Vieno, Stanisław Górecki, fondinto kaj direktoro de Lignoindustria Teknikumo.

En 1968 Stanisław Czajowski realigis revon de sia vivo finante foreste matematikon en la Supera Pedagogia Lernejo en Krakovo. En 1972 li emeritiĝis. Finfine li plene povis engaĝi sin en la afero de Esperanto. Li kontaktiĝis forte kun krakova esperantistaro kaj komencis partopreni E- kongresojn kaj aliaj E- aranĝojn. Precipe multe da amikoj li trovis en Bulgario kaj Hungario. Janos Pattay el Budapeŝto estiĝis lia la plej fidela amiko. Multfoje gesinjoroj Czajowski vizitadis Budapeŝton gastigitaj de Janos Pattay. Sinjorino Adela Czajowska, la edzino de Stanisław, konvinkita al Esperanto, komencis lerni ĝin kaj post fino de kursoj baldaŭ fervore ekagadis en la internacia medio.

Dum malfacilaj okdekaj jaroj, Janos Pattay, emerita fervojisto ofte alvenadis al Krzeszowice, importante dolĉaĵojn kaj kafon por senfortigitaj jam per malsanoj, gesinjoroj Czajowski. Poste vizitadis la tombon de Amikoj...

Lia nobleco, boneco, sindonemo kaj granda persona kulturo ekinspiris la filinon de gesinjoroj Czajowski al lernado de Esperanto. La kurson ŝi finis en Katowice por ke daŭrigu korespondadon kaj kontaktojn kun geamikoj de ne vivantaj jam gepatroj.

Ni, membroj de Esperanta Klubo en Krzeszowice renkontiĝis kun sinjorino Krystyna Czajowska- Michalska en la loĝejo de la nepino de gesinjoroj Czajowski, Agnieszka. Ŝi ricevis ĝin kiel heredaĵo de geavoj.

Kun ne kaŝita kortuŝo ni rigardis la familiajn memoraĵojn, fotojn, librojn kaj ankaŭ du verdajn legitimilojn kaj du verdajn steletojn.

Maria Ostrowska

PILGRIMO SZYNDZIELNIA – SZCZYRK

En la lasta dimanĉo de aŭgusto okazis Jubilea XX Pilgrimo tra la montaro Beskidy organizita per esperantistoj el Bielsko- Biała. En la dimanĉa pilgrimo partoprenis pli ol 60 personoj el diversaj urboj: Bielsko- Biała, Katowice, Sosnowiec, Opole, Kraków, Zakopane. El nia klubo alvenis 3 personoj. Al la monto Szyndzielnia ni alvenis diversmaniere; plimulto per ŝnurvagonaro, iuj partoprenantoj supreniris tamen perpiede. El Szyndzielnia kondukis nin vojo parte tre malfacila, do la pilgrimado daŭris pli ol du horoj. Ni celis al Szczyrk- Górka, kie troviĝas la preĝejo de Dipatrino. En 1894 ĉi-loke al iu knabino aperis Dipatrino. Profunde religiema loka loĝantaro decidis memorigi la miraklon kaj konstrui preĝejon. Administras ĝin pastroj Salezianoj. En la preĝejo la esperantan sanktan meson celebris pastro Józef Zielonka. Malantaŭ la sanktejo, inter arboj kaj flo-roj staras la figuro de Dipatrino kaj apude fluas la fonto kies pura kaj malvarma akvo refreŝigas lacajn pilgrimojn. Tie, kune kun pastro Zielonka ni ankoraŭ preĝis, kantis, fotis kaj babilis promesante venontjare denove renkontiĝi.

Anna Kołpanowicz